

La propagandisto, de Julio Baghy
Claude Gacond, 332-a radioprelego, 1970.02.18 & 21

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Antaŭ unu monato ni legis al vi karikaturon de Julio Baghy pri la kluba vivo. Hodiaŭ permesu, ke ni legu al vi karikaturon de nia hungara samideano pri *la propagandisto*. Tiu teksto ĵus aperis en la decembra numero de *Svisa Espero*. Vi povos ricevi ekzempleron de tiu organo de Svisa Esperanto-Societo petante ĝin al Radio-Svislando.

A.- Ni devas bedaŭrinde mallongigi tiun karikaturon, sed malgraŭ tio vi tutcerte ĝuos pri ĝi. Jen tiu karikaturo pri **propagandisto** de Julio Baghy.

Cl.- « Li estas konstante ebria pro siaj ideoj.

A.- Li rifuzas manĝi viandon, naŭze turnas sin for de la fumantoj, kondamnas eĉ bier-trinkantoj je frua morto aŭ je mensa bankrotiĝo.

Cl.- Pro sia naturamikeco li havas nur sandalojn kaj obstine lasas hejme sian ĉapelon.

A.- Pro sia proleta mondpercepto li rifuzas la lukson de kolum- kaj kravat-portado, sed por demonstracii pri sia neŭtraleco li ne toleras la Verdan Stelon kun ruĝa kadro en la butontruo de sia jakso. La ruĝa kadro estas jam politiko. [...]

Cl.- Li havas provizon da elastaj argumentoj en la kapo kaj faskegon da diversaj presaĵoj en sia aktujo.

A.- Al ŝoviniistoj li parolas pri la uzo de Esperanto dum la mondmilito en la germana propagando kaj avertas, ke la burĝa ideologio baldaŭ falos, se la malamikoj de la nuna mondo cedas Esperanton kiel monopolaĵon al la proletaro. Al pacistoj li asertas, ke la germanoj estas venkitaj pro la misuzo de Esperanto. [...]

Cl.- Al klaskonsciaj laboristoj li proponas la lingvon el vidpunkto de internaciismo kaj promesas per ĝi baldaŭan faligon de la kapitalismo. Al kapitalistoj li aŭguras nepran kaj centprocentan profiton per la enkonduko de la lingvo.

A.- Al katolikoj li predikas pri **Unu ŝafisto kaj unu ŝafejo**, en kiu la ŝafaro povas kompreni unu la alian nur per Esperanto kaj li ne forgesas mencii, ke malgraŭ tio, ke **tiu** Zamenhof estis judo, tamen li havis krucifikson en sia laborĉambro laŭ aserto de Edmond Privat. Al protestantoj li montras la Biblion, ĉe judoj zorge prisilentante la **krucifiksan aferon** li klopodas pruvi per memfarita genealogio, ke la Majstro devenis rekte de reĝo Davido kaj pro tio ĉiu judo plenumas gentan devon lernante la lingvon.

Cl.- La unuan fojon mi renkontis lin en kafejo.

A.- Por pli senĝene observi lin mi kaŝis mian Verdan Stelon. Li staris kaj parolis al siaj **disĉiploj**.

Cl.- « *Jes, karaj geamikoj, mi estas la homo de la praktiko. Nenjam mi lernis Esperanto el libron. Min ne interesiĝas la gramatikon, ĉar ĝi malfaciligas la uzado de la lingvon.* »

A.- « *Tuj oni povas konstati tion !* » – rimarkis iu.

Cl.- « *Kial? Ĉu pri tiun akuzativo?* » li temperamente defendis sin. « *La akuzativo ne gravas. La plej ĉefa estas la praktiko kaj la interna ideo sen aŭ kun akuzativon... Mi volas raportiĝi pri miaj sukcesoj.* »

A.- Li prenis notlibreton el sia poŝo kaj laŭtlegis.

Cl.- « *Sabate : algho de du mil sigelmajloj en ĉiu vagono de la Metro.*

La propagandisto, de Julio Baghy
Claude Gacond, 332-a radioprelego, 1970.02.18 & 21

A.- Metro estas subtera fervojo en Parizo.

Cl.- *Ok horojn mi laboris sub la tero. Elspezo nur 79 centimoj, kiuj vi redonos al mi el la propaganda kaso. Dimanĉe : partopreno en ekskurso. Vestita en mia propaganda kostumo kun la broditajn verdajn stelojn kaj kun la surskribo **Lernu Esperanto !, Vivu Esperanton !** mi rondbicikladis en la arbaro. Nepriskribebla sukceso. Ĝis raŭkiĝo mi parolis kaj disdonis tri mil diversaj folioj ; kaj vendis eĉ du gramatikoj... Lunde : mi faris plano por mardon. Elspezo unu folio da skribpapero 10 centimojn. Marde : mi kontrolis la lunde farita plano kaj vespere mi vizitis la kunveno en la Verda Koko, kie mi vendis 15 insignoj. La vendiĝo donas profito 20 frankoj al la propaganda kason. Merkrede mi legis la leteroj, kiuj alvenis dum lastajn tagojn. Terura laboro ! Multaj samideanoj uzas tiaj vortoj, kiuj mi ne renkontas en mian praktikon.*

A.- Temas pri la gazeto **La Praktiko**.

Cl.- *Zamenhof diris, ke la stilo estas simpla kaj komprenebla. Elspezo 5 frankojn por vortaron. Jaŭde : mi renkontis kun unu viro sur unu strato. Li demandis pri la Verda Stelo en mian jakon. Poste mi eksciis, ke tio viro antaŭ tagoj liberiĝis sin el la malliberejo. Li estis viktimo de sia amiko, kiu persvadis kaj devigis lin ĉirkaŭbori kaj prirabi la monŝrankon de bankon. Tuj venis al mi ideo: mi faros li esperantiston. »*

A.- « Nu, tio estas troigo! Finfine kio okazus, se ĉiuj fripono, ĉarlatano kaj ŝtelisto lernus Esperanton ? » indignis iu.

Cl.- « Mi faris ankaŭ la sama demando al mi kaj mi trovis, ke ĉiu malutilo alportas utilo. Se la friponoj organiziĝos sin kaj lernos Esperanto, fine la polico devos akcepti nia kara lingvon kun la interna ideo. Jes, la interna ideo ! Amu unu la alian ! Ĝuste la fripono bezonas ĝin. Nu, se la friponoj amos unu la alia kaj amos ĉiun verdstelulo, certe Esperanto fariĝos plej bona asekuro kontraŭ ili kaj ni savos la mondo per Esperanto. Vivu Esperanton ! »

A.- « Vivu ! Vivu ! Vivu ! » - « Sen akuzativo » rimarkis obstinulo.

Cl.- « Efektive estus pli oportune sen akuzativon, sed mi estas ĝisosta fundamentisto kaj min interesiĝas ne la lingvo, nur la praktiko... Sed nun, karaj geamikoj, ni kantu nian grupan himno. Laŭte ! Forte ! Kuraĝe ! Elegante, por ke – ne porke – la homoj sciu sur la strato, ke ni praktikas nia kara lingvo... »

A.- Mi devas konfesi, ke la efiko ne forestis. Ĉe la pordo granda amaso ĝuis la himnoblekadon de la **geamikaroj**. La duan strofon mi jam ne aŭskultis. Mi rifuĝis el la kafejo. [...] »

Cl.- Vi aŭdis parton el karikaturo de Julio Baghy. Se vi deziras relegi tiun tekston, vi povas skribi al Radio-Svislando petante la sendon de la decembra numero de la gazeto *Svisa Espero*, en kiu ĝi aperis.

A.- Kiel Julio Baghy ni opinias, ke « *Se Esperanto iam venkos, tio okazos spite al la **fervoraj propagandistoj**.* »

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-